

● **UMBERTO ECO** : 20-25 feb 2011 okazis la 25-a Internacia Libro-Foiro de Jerusalemo, prestiĝa aranĝo, kiu okazas ĉiun duan jaron en la plej granda kongresa centro de Jerusalemo, Binjane Hauma. Jam la trian fojon ELI havis tie budon kun Esperanto-libroj kaj revuoj. Pli ol 40 personoj enskribiĝis por la Esperanto-kurso, malfermita en Jerusalemo post la foiro, kaj centoj interesiĝis kaj ricevis flugfoliojn pri Esperanto. En la solena malfermo salutis la prezidento Shimon Peres, la ministrino pri edukado Limor Livnat kaj la urbestro de Jerusalemo Nir Barkat. Partoprenis ankaŭ la famaj israelaj verkistoj Meir Shalev kaj David Grosman. Dum la Foiro Amri Wandel renkontiĝis kun la fama itala verkisto Umberto Eco (kiu verkis i.a. pri Esperanto) kaj donacis al li la kompaktdiskon lastatempe eldonitan de ELI *Kanti Gefratoj Kune* kaj la lastan n-ron de la bulteno *Israela Esperantisto*. La Esperanto-budon vizitis eminentaj gastoj kiel la fama israela verkisto A.B. Jehoshua, Salaj Meridor, eksa ĉefo de la Juda Sohnut kaj ambasadoro en Usono. Dum la tuta semajno deĵoris en la budo 13 aktivuloj de ELI. Pliaj fotoj videblas ĉe <https://picasaweb.google.com/Amri.nivut/JerusalemaLibroFoiro>.

**Amri Wandel**

